# La fotoalbumo, vol. 1

Trevor Steele: *La fotoalbumo,* vol. 1. Vieno: Internacia Esperanto-Muzeo, 2001. 366p broŝ.

**Romano**

Nia amiko kaj kolego Trevor Steele regalas nin per ankoraŭ plia romano, kaj la indiko ke temas pri "Unua volumo" ekscitas la apetiton legi pli.

Mi legis ie recenzon, en kiu la recenzinto esprimis sian malfeliĉecon ĉar li anticipis vidi fotojn en ĉi tiu libro, sed eĉ ne unu foto, nek eĉ unu bildo, estas en la tuta volumo. Temas, kompreneble, pri imagobildoj, fotoj kiujn la leganto, kune kun la verkinto, imagas ĉe la komenco de ĉiu ĉapitro. Nekutima, kaj por ĉi tiu romano mirige inspirita, maniero verki fikcian verkon. Efektive, ne estas vere prave paroli pri "ĉapitroj" en ĉi tiu verko, ĉar neniu el ili estas nomita aŭ numerita, kaj ne troviĝas tabelo de enhavo. Ĉu estas tamen strange, ke de la manoj de talentega verkisto, la leganto ne sentas mankon?

La naturo de la romano estas temo jam antaŭe provita de multaj verkistoj; mi pensas, ekzemple, pri *Kiel akvo de l' rivero* de Raymond Schwartz. Sed Trevor multe pli sukcesis ol Schwartz - nu, Schwartz ne estis vera romanisto, kaj li ne sciis mem redakti sian verkon por elsarki la tedajn partojn. Ĉu Trevor redaktigis sian romanon, mi ne scias (mi suspektas ke ne); sed la leganto vane serĉas en ĝi teda(j)n parto(j)n.

La intrigo de la romano: ni sekvas la vivon de Patrick O'Shea, lia edzino Diana, kaj iliaj sep infanoj: Matt, Sean, David, Vanessa, Rita, Zoe, kaj Bernie. Ili loĝas en malgranda vilaĝo nomata Aglo-Nesto, en Kvinslando.

Diana estas katoliko, Paddy (t.e. Patrick) estas, nu, nereligia, pli ofte kontraŭreligia, kaj religiaj aferoj grave kaj abunde rolas en la romano. Paddy kaj Di geedziĝis en januaro 1939, sed la rakonto vere komenciĝas en 1944, kaj la lasta "foto" estas el la vintro, aŭ frue post la vintro, de 1965.

Kompreneble la vivoj de la naŭ ĉefrolantoj multmaniere kunligiĝas, tiel ke necesas post vinjeto el la vivo de unu el ili transiri al vinjeto el la vivo de alia, ktp. La verkista genio de Trevor Steele montriĝas per tio ke ni neniam sentas ĝenon pro tio. Male, ju pli ni legas la detalojn de ĉiu el tiuj personoj, des pli ni kredas kompreni la tutan familion.

Ĉu la vivoj de naŭ tre ordinaraj Aŭstralianoj povas vere interesi? Neniu el ili estas "gravulo", nenio kion la mondon taksus kiel "ekscitan" estas en ilia vivo. Neniu "intrigo" estas en la rakonto; malgraŭ tio, fininte la legon de la romano, mi esperis ke vere aperos dua volumo, ĉar la rolantoj fariĝis miaj intimaj amikoj.

Nu, mi ne volas apoteozi TrevorSteele-n. Li ankoraŭ ne atingis la rangon de Graham Greene, kiu iom

similcele ekzamenis la psikojn de siaj romananoj. Sed Trevor rapide proksimiĝas al tiu rango; lia *Neniu ajn papilio* komencis moviĝi en la direkto de *Brighton Rock* de Graham Greene; *La fotoalbumo* iras en la direkto de *The Heart of the Matter*. Ambaŭ aŭtoroj havas gravan komunan trajton: ili verkas el propraj personaj spertoj tre kompleksaj, kaj per siaj romanoj penas iom post iom koni sin mem.

Kion pli diri, do? Se vi ĝuas veran literaturon, ĉi tiu romano plenumos viajn legesperojn.

---

[Trevor Steele]

[La fotoalbumo]